



Konkurso de mallongaj filmoj

Teo • Amo

Kiel nia lingvo Esperanto, teo povas roli kiel perilo por amo kaj geedziĝo. Bonvolu rakonti per filmeto pri teo kaj amo, vi havos ŝancon **senpage vojaĝi al Ĉinio.**

Foje diris Julio Baghy: *“Amo kreas pacon, paco konservas humanecon, kaj humaneco estas la plej alta idealismo.”* Amo estas la kerno de nia lingvo Esperanto. Kaj Teo, kiun trinkas ĉiutage du trionoj de la monda loĝantaro, estas la magia trinkaĵo, kiu vekas energion kaj iniciatas la vivmanieron de paco kaj amo. Tion celas ankaŭ nia lingvo Esperanto.

Do, aliĝu! Rakontu pri teo kaj amo per mallongaj filmoj! Ni estas pretaj gastigi vin en Ĉinio!

Celo

Sub aŭspicio de UEA, la konkurson lanĉas Ĉina Radio Internacia kaj aliaj ne-esperantistaj sponsoroj, subtenantoj kaj asistantoj, celante:

- A) evoluigi la arton de mallonga filmo en la internacia lingvo kaj premii partoprenantojn, kiuj elstariĝis pro sia kontribuo al la arto de mallonga filmo.
- B) montri al la publiko, ke Esperanto estas viva, utila, vigla kaj profita....

C) atentigi ne-esperantistajn rondojn, allogi novajn “esperantistojn”, precipe junulojn, interkomuniki asociojn kaj klubojn de Esperanto kun lokaj radioj, televidoj, ĵurnaloj kaj aliaj ne-esperantistaj rondo, kaj aktivigi individuojn kaj asociojn de Esperantujo.

D) Provi merkatigi Esperanton (La konkurson monsubtenas ĉinaj te-entreprenejoj, societoj kaj lokaj registaroj)

La **Regularo** kaj la **Aliĝilo** troviĝas sube kaj en la jenaj ligiloj:

esperanto.cri.cn/filme(esperante)

esperanto.cri.cn/filmc (ĉine)

Regularo

Tagordo

Programo/Monato	6	7	8	9	10	11	12	1	2	3	4	
Filmo-kolektado	■											
Aljuĝo de ĵurio								■				
Interreta Voĉdonado								■				
Premiado/Filmfestivalo											■	

Partopreno

- Partoprenos ĉiuj!

Amatoraj reĝisoroj, filmŝatantoj, amaskomunikilistoj, studentoj kaj kreemaj homoj el la tuta mondo.

- La aliĝo al la konkurso estas **senpaga**.
 - Limdato estas la **30a de novembro 2014** laŭ la pekina tempo.
 - Ĉiu filmo devas rilati al la temo “Teo kaj Amo”, **teo kaj amo devas esti ligitaj**.
 - Ĉiu filmo estu **minimume 2** kaj **maksimume 10** minutojn longa.
 - La filmo estu en la formato **MP4**.
 - Estas permesataj desegnofilmoj, muzikfilmoj, dokumentaj filmoj, teatraj filmoj kaj iuj aliaj.
 - Uzeblas iu ajn aparato por filmado, ekz. poŝtelefono, filmkamerao kaj (iu alia) similaj.
 - Ĉiu lingvo** de la mondo povas esti uzata.
- Se la filmo estos farita **ne** en Esperanto, la filmfarantoj sin turnu al sia loka aŭ nacia Esperanto-asocio, aŭ al Ĉina Radio Internacia, por ke la filmo estu esperantigata subtitole.
- Filmfarantoj **ne** aldonu subtitolon, nur skribu subtitolon en la aliĝilo (sube).
 - La partoprenanto estas la persono, kies nomo estas enskribita en la aliĝilo (sube).
 - Se estas filmgrupo, unu reprezentanto el ĝi anoncu sin en la aliĝilo.
 - La konkursaĵo kaj la aliĝilo estu sendita al:

A) La retroŝtadreso **1150158647@qq.com**

aŭ

B) La durdisko de servilo ftp.cri.com.cn

Bonvolu malfermi iun ajn dokument-pakaĵon en via komputilo kaj skribi **ftp.cri.com.cn** en la adresa kampo. Tiam aperas dialogujo, kaj tie vi enmetu la nomon **espradioup** kaj la sekretan kodon **criesp**. Post tio vi sendu la aliĝilon kaj la filmon

(vidu la skemon)

unua paŝo



dua paŝo



Tria paŝo



C) Youtube

Publikigu la filmon en Youtube, skribu en aliĝilo la retadreson kaj sendu la aliĝilon al la retpoŝtadreso **1150158647@qq.com** aŭ **filmkonkurso2014@163.com**

- La partopreno en la konkurso signifas komprenon kaj akcepton de ĉiuj punktoj de ĉi tiu regularo.

-Demandoj rilataj al la konkurso estu senditaj al

A) la retpoŝtadreso **amo@cri.com.cn**

B) Skype **esperanto.film**

Facebook **espradio@cri.com.cn**

C) telefone **0086-10-68891795**

Rajtigo

- La kopirajto pri la muziko por publika uzo devas esti certigita.

- La personoj en la filmo permesis la uzon por publika prezento.

- La filmfaranto garantias, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke neniuj rajtoj de aliaj personoj estas lezitaĵ.
- Post la konkurso la filmoj estos libere prezentebaj por ĉiuj sub la “Creative-Commons-Licence (CC-BY)”.

Juĝo

Juĝo konsistas el Aljuĝo de ĵurio kaj Interreta Voĉdonado.

Aljuĝo de ĵurio: Naskiĝo de dek unuaj premioj, dek duaj kaj dek triaj

A) Unuan juĝadon respondecas Ĉina Film-Artista Asocio

B) Finan juĝadon respondecas la ĵurio, konsistanta el **Mark Fettes**, **prezidanto de UEA**, kaj fakuloj el kampoj de tekulturo kaj filmfarado.

Interreta Voĉdonado: 10 Premioj de la publiko

A) Por la **premio de publiko**, la publiko voĉdonos por sia plej ŝatata

filmo en la retejo ***esperanto.cri.cn/filme*** (esperante)

esperanto.cri.cn/filmc (ĉine), sen difinita kriterio.

B) La voĉdonanto devas liveri necesajn informojn por okaze ricevi

donaceton. Dum la voĉdonado naskiĝos unu gajnanto de donaceto unusemajne.

C) La voĉdonado daŭros de januaro ĝis marto de 2015.

Jura traktado de la rezulto ne eblas. Se Ĉina Radio Internacia ne ricevos sufiĉe multajn filmetojn, ĝi rezervas al si la rajton, nuligi iun premion.

Premioj

- **Dek unuaj premioj**: 10 reprezentantoj de filmfarantoj de la 10

premiotaj filmoj **senpage 5-tage vojaĝos al Ĉinio**
kaj partoprenos en Esperanto-Filmfestivalo, kiu
okazos **aprile, 2015**.

**Ni pagos veturkoston, loĝadon kaj nutraĵon de la 10 personoj, kiuj
reprezentas la filmfarantojn de la 10 premiotaj filmoj dum la
festivalo, se al la filmfestivalo partoprenos aliaj filmfarantoj de la
premiotaj filmoj, ni nur pagos nutraĵon kaj loĝadon dum la festivalo
(5 tagoj).**

- **Dek duaj:** Atestilo kaj premi-donaco
- **Dek triaj:** Atestilo kaj premi-donaco
- **Dek premioj de la publiko:** Atestilo kaj premi-donaco

- Anonco de la rezulto de la konkurso okazos en Esperanto-Filmfestivalo,
kiu okazos **aprile, 2015** Ĉinio.

- La rezulto de la konkurso estos publikigita en la retejo de Ĉina Radio
Internacia(ĈRI): *esperanto.cri.cn/filme (esperante)*

esperanto.cri.cn/filmc (ĉine)

*ĈRI-Oficejo:

Esperanto Service, CRI-36

China Radio International

P.O.Box 4216, Beijing

P.R.CHINA 100040

Rimarkigo: Esperantistoj estas invitataj traduki tiun ĉi dokumenton al aliaj lingvoj. – Dankon.

Aliĝilo

Nomo de la partoprenanto		Aĝo	
Ŝtateco		Profesio	
Telefono kaj Retpoŝtadreso			
Reta ligilo por elŝuti ĝin (Marki la <input type="checkbox"/>)	<input type="checkbox"/> 1150158647@ qq.com <input type="checkbox"/> filmkonkurso2014@163.com <input type="checkbox"/> ftp.cri.com.cn <input type="checkbox"/> adreso de Youtube :		
Titolo de la konkursaĵo			
Resumo de la konkursaĵo			
subtitolo			
Rajtigo	<p>Mi garantias, ke la konkursaĵo estas originala, ke mi havas ĉiujn rajtojn sur la konkursaĵo kaj ke ĉiuj informoj donitaj estas veraj.</p> <p>Mi garantias, ke</p> <ul style="list-style-type: none"> - La kopirajto pri la muziko por publika uzo devas esti certigita. - La personoj en la filmo permesis la uzon por publika prezento. - La filmfaranto garantias, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke nenij rajtoj de aliaj personoj estas lezitaj. - Post la konkurso la filmoj estos libere prezenteblaj por ĉiuj sub la “Creative-Commons-Licence (CC-BY)”. <p style="text-align: right;">Dato: _____</p>		

SALUTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Nome de Universala Esperanto-Asocio, mi esprimas niajn gratulojn al Ĉina Radio Internacia pro ĉi tiu unika kaj valora konkurso.

En la nuna epoko, filmo kaj video fariĝis pli gravaj ol iam ajn antaŭe por kunligi homojn el ĉiuj kontinentoj. Ne plu estas tiel, ke nur profesiuloj kun granda buĝeto povas produkti kaj disvastigi siajn kreaĵojn. Filmo fariĝis tre demokratia, fleksebla kaj malmultekosta rimedo, per kiu eblas ŝerci kaj seriozi, festi kaj protesti; per kiu eblas ekhavi pli veran bildon pri la ĉiutagaj zorgoj, espero kaj streboj de niaj kunhomoj tra la mondo.

Tiuj estas ankaŭ la celoj de Esperanto - unike demokratia, fleksebla kaj malmultekosta lingvo por tutplaneda komunikado. Tial UEA volonte subtenas ĉi tiun konkurson, kaj kunlaboros por sukcesigi ĝin.

Gratule kaj bondezire

Mark Fettes

Prezidanto

Universala Esperanto-Asocio